

LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTO-
RÖRELSEN I SVERIGE

UTGIVEN AV GEFLE
ESPERANTOFÖRENING

Officiellt organ för Svenska Esperanto-Förbundet (S. E. F.) och Norvega Esperantista Ligo (N. E. L.)

Redakcio: J. LUNDGREN, Hedemora, J. HEL-
SING, Gävle. Adreso por korespondado: Gävle.
Ansvarig utgivare — responda eldonanto kaj
administranto: W. WAHLUND, Gävle, (Svedujo).

N:o 11.
November 1915.

Prenumerationspris — abonprezo: i Sverige
1: 20 kr., i Norge 1: 60 kr., eksterlande 1: — Sm.
(1: 82 kr.).
Lösnummer 10 öre.
Annonspis — anoncprezo: 5 öre pr mm.

La nova propagandilo.

Ni petas favoran atenton por la anonco pri la nova svedlingva propagandfolio. Ĝi celas la bonon de nia afero; ke la internacia helplingvu estu pli kaj pli konata, uzata kaj ŝatata en nia lando.

La metodoj por dissemi propagandilojn estas multaj. Komprenoble oni povas disdoni ilin al konataj kaj nekonataj personoj. Oni ankaŭ povas »forgesi» ilin en fervojaj vagonaroj kaj atendejoj, sur pasaĝersipoj kaj kafejaj tabloj. Oni povas meti foliojn en forsendotaj leteroj, kaj, se oni estas negocisto, oni povas donaci ilin al klientoj. Utile estas ĉiam porti en la poŝto kelkon da folioj, por liveri al personoj, kiuj ĉe interparolado aŭdigas iom da intereso, aŭ kiuj demandas la signifon de la verda stelo, kiu sidas en nia butontruo.

Nia bela, praktike utila, facila, benata helplingvo meritas esti konata en vastaj rondo. Kaj la laboro ne estos sen rezultato, kvankam ofte povas ŝajni tiel. Propagandante Esperanton inter samlandanoj, ni plezumas devon al niaj fremdlandaj samideanoj, kiuj siaflanke klopodas kaj sukcesas fari la helplingvon uzebla ĝuste al ni por pli kaj pli multaj rilatoj inter Svedujo kaj aliaj landoj.

Se el dek semoj nur unu ĝermos pli malpli baldaŭ, ni ne malsukcesas.



Bär Esperantostjärnan!

Arbetaren och Esperanto.

Ett uttalande av Walter Thomas Mills.

Jag bevistade en gång sammanträdena vid en internationell kongress. Dess förhandlingar fördes på tre språk. Men där funnos sjutton nationaliteter representerade, som icke talade något av dessa språk.

Det fanns en del ombud där, som kunde flera språk, men där fanns ingen, som kunde tala med eller förstå alla de andra. Alla de nationer, som nu äro i krig, voro representerade. Det var ett rörande skådespel att se dessa folkslag försöka förstå varandra. Det har redan visat sig en gång till, i en världsomfattande tragedi, att de ej kunna det.

Få av dem som ta språklektioner i skolorna äro ens i stånd att få en tillräcklig kunskap i ett enda främmande språk. Ingen kan behärska dem alla.

Det läres flera språk genom personlig beröring och på grund av behöv än på något annat sätt, men detta sätter sällan den som lärt sig ett språk i beröring med det bästa och högsta hos den nation, vars språk lärts på detta sätt.

Esperanto öppnar vägen för arbetarna, för de flitiga och fattiga, att genom studiet av ett språk, det lättaste av alla språk, som någonsin skrivits, ösa ur källorna till kunskap i alla folks bästa tankar och bästa strävanden.

Arbetarna, de manliga såväl som de kvinnliga, äro idoga, betungade, och fattiga på ägodelar, ehuru de

kunna vara andligt rika, och behöva, framför alla andra, känna varandra oberoende av de nationella gränserna och alla rashinder över hela jorden.

Jag har sammanträffat med esperantister i femton olika land under en fem års resa jorden runt. De äro alltid värdefulla människor, som mitt under tusen andra omsorger söka förstå varandra över hela världen.

Esperanto bjuder de flitigaste arbetarna ett tillfälle aldrig förr givet någon — möjligheten att inhämta det bästa som sagts på alla levande språk i hela världen.

I forna dagar voro främlingar fiender. Fångar gjordes till slavar, att döda varandra var människors sysselsättning.

I den tid, som skall komma, skola främlingarna tala, innan de slå till. De skola förstå. De skola komma att känna varandra. Den som verkligen lär känna en annan, finner en vän.

Det band, som ett gemensamt språk utgör, skall förena alla nyttiga folk i hela världen till ett enda broderskap.

Några få minuters dagligt studium, en värld av tålmod och en värld att vinna. Detta är priset och detta är lönen.

Handelsorganisationer, läroverk, vetenskapliga institutioner och nu Europas lärar använda Esperanto.

Arbetarna kunna det också. Arbetarna måste göra detsamma.

Från engelskan av *Pehr*.

»Pacifika Espero».



Utilo de Esperanto.


(Nyttan av Esperanto.)

Germana laboristo-esperantisto, S:ro Schabenthan, rakontis pri travivajo en Londono, kelkan tempon antaŭ la milito. Jen liaj vortoj:

Pro sopiro ekkoni aliajn landojn kaj ties enloĝantojn mi forvojaĝis de Stuttgart por veni en Anglujon. Sed mi ne sciis unu frazon anglan. Alveninte en Londono, mi serĉis en la stacidomo afiŝon esperantan, sed ne trovis. Meditante pri okazo trovi esperantiston — adreson mi ne posedis — mi trairis straton. Jen lanterno kun surskribo »Police-Office»; mi eniris en la domon kaj petis policanon pri adreslibro. Sed ho! li ne povis kompreni min, nek mi lin. Post multaj mansignoj kaj grimacoj mi rimarkis, ke li fikse rigardas mian Esperanto-insignon, liaj trajtoj esprimis demandon, kaj la buŝo eligis la vorton »Esperanto»? Mi diris »jes», ĉar tio estis la sola vorto, kiun mi sciis, kaj li gestis, ke mi lin sekvu. Tra kelkaj stratoj mi iris kaj venis en domon. Tie la policano diris kelkajn vortojn, kaj foriris. Mi ne povis danki lin kaj sekvis la pordistinon en la atendsalonon. Post unu minuto venis fraŭlino, bonvenigante kaj salutante min Esperante. Mi tre ĝojis povi paroli kun homo. Ŝi nun diris al mi kelkajn adresojn de Londonaj esperantistoj, kaj plue, ke tiu vesperon okazos propagand-kunveno en iu kolegio. Post kelka tempo mi adiaŭis, promesinte veni al la dirita kolegio. Foririnte mi rigardis la urbon kaj donis vespere al tramveturigisto la adresbiletan de la kolegio. Nun mi veturis iom tro rapide, por germanaj sentoj, tra la urbo. Ie oni gestis al mi, forlasi la veturilon kaj eniri proksiman domon. Esplorante de kiu flanko mi eniru la domon, mi aŭdis kanti la Esperantohimnon. Gaje mi supreniris kaj estis bonvenigata kiel kamarado, kvankam la ĉeestantoj apartenis al la bona socio. Iu eminentulo propagande parolis kaj bonvenigas min publike de sur la tribuno. Ĉar mi estis instigita de kelkaj gekamaradoj, mi parolis ankaŭ de sur la tribuno kaj rakontis pri miaj aventuroj Londonaj; kaj kiam mi estis dirinta, ke mi sentas min esti en ĉielo, aŭdante la karan fratingvon en fremda lando, ne volis finiĝi la aplaŭdo. Estas ankoraŭ

necese diri, ke ĉiuj esperantistoj, ĉiuj kaj ĉie en Anglujo, tre fervore akcelis miajn intencojn, por ke mi povu konstati la bonecon de Esperanto.

Laŭ Germana Esperantisto.



Adverben i Esperanto.

Om man säger: la hundo kuras, så berättar man att la hundo utför en verksamhet (hundo är substantiv, kuras är verb). Säger man däremot: la hundo kuras *tie*, så angiver man även *platsen*, där den ifrågavarande verksamheten äger rum.

Man kan likaså säga: la knabo ludas, eller: la knabo ludas *nun*. I sista fallet anges även *tiden* för den omnämnda verksamheten.

Om man säger: la arbo estas alta, anger man en egenskap hos la arbo (alta är adjektiv); man kan också säga: la arbo estas *tre* alta, och anger därigenom även *graden* av nämnda egenskap.

Plats, tid eller sätt för verksamhet, händelse eller tillstånd (uttryckt genom verb) kan bestämmas på två sätt, antingen genom *adverb*, eller också genom preposition tillsammans med ett substantiv (exempel: la hundo kuras *sur la vojo*, la knabo ludas *dum la libertempo*, la arbo estas alta *je dek metroj*; prepositionerna i Esperanto kunna utbytas mot akusativändelsen -n, om meningen i satsen därvid framträder lika tydligt).

Adjektiven tjäna även till bestämmande av plats, tid eller grad hos egenskaper (uttrycka genom adjektiv), exempel: *hejme* feliĉa, *matene* dormema, *tre* alta, *tro* fama, *pli* granda, *plej* estiminda. Härförutom kunna adverb användas även för att närmare bestämma andra adverb; exempel: *tre* multe, *hodiaŭ* *matene*.

Adverben äro av två skilda slag: a) självständiga och b) härledda. De sistnämnda adverben bildas i Esperanto genom tillfogande av ändelsen -e till en ordrot.

Exempel:

a) *hier*aŭ mi ricevis leteron; *mor*gaŭ mi skribos respondon;
la neĝo estas *neniam* varma;
oni devas labori *tiom*, *kiom* oni povas;

nenie mi trovis tion, kion mi serĉis;

la ĉielo *hodiaŭ* estas *tre* blua;

b) la ĉielo estas *hele* blua;

la infano lernas *diligente*;

la tasko estas *tute* plenumita;

la gasto estis *frake* vestita;

la muso sidas *entru*e (=en truo);

ŝipo veturas *surmare* (=sur maro);

supre sur la monto;

mi laboras *laŭpove* (=laŭ povo);

la vento *subite* forblovis la ĉapelon;

la ĉasisto trinkis *multe* da biero;

li *antaŭe* trovis akvon en la arbaro, sed akvon li *nevolonte* trinkas, aŭ almenaŭ *malmulte*.

* * *

Petro renkontis amikon *irante* al la vilaĝo. Adverbet *irante* tillhör här (»bestämmer») verbet renkontis. Alltså: Petro iris al la vilaĝo, kiam la renkonto okazis. Huru la amiko färdades är ej omnämmt i satsen. Däremot: Paŭlo renkontis Petron *irantan* al la vilaĝo. — Paŭlino renkontis amikininon *veturantan* al la urbo. Adjektivet *veturantan* hänförs sig till substantivet amikininon, men satsen anger ej huruvida Paŭlino estis *iranta* eller *veturanta*.

Härav framgår, att adverb, som bestämma sätet för en genom *verb* angiven verksamhet eller händelse, ovillkorligen äro hänförliga till satsens subjekt. I andra fall, och i synnerhet om ett adverb »bestämmer» adjektiv eller ett annat adverb, kan det även vara hänförligt till satsens objekt.

Exempel: *irante* en la ĝardeno mi vidis paseron fervore mangantan en la ĉerizarbo. *Fervore* bestämmer här adjektivet mangantan, vilket i sin tur är hänförligt endast till substantivet paseron, d. v. s i detta fall satsens objekt.

* * *

För fullständighetens skull må slutligen här erinras, att adverben i Esperanto kunna antaga akusativändelsen -n för betecknande av riktningen eller målet för en rörelse. Exempel: Antaŭen! Ni iru rapide *hejmen*.

Jln.



Samideanoj!
Abonu "La Espero"!

La paliskonstruaĵoj en Svisujo.

II.

Je longo de dek kaj pluraj futoj la hake aŭ brule pintitaj palisoj penetris en la lagfundo, je interspacoj de unu aŭ unu kaj duona futoj, kaj ordigitaj laŭ preskaŭ rektaj linioj. Iliaj supraĵoj finoj troviĝis en nigra kulturtavolo dika je 2 ĝis 2½ futoj, kiu siavice estis kovrita de konsiderinda aluvia tavolo, »kia kolektiĝas ĉie en malprofundaj, de ondbatoj malmulte movataj golfpartoj de lagoj». La nigra kulturtavolo estis la gravaĵo. En ĝi kuŝis la mastrumiloj de la iamaj paliskonstruaĵoj, iliaj ĉasiloj, kaj ilia kuireja fortjetajo. Per tio oni havas komparilon, laŭ kiu oni nun post jarmiloj povas mezuri la gradon de la kulturo de la malaperintaj kaj forgesitaj paliskonstruaĵoj. La kabanaj mem, konstruitaj el argila mortero kune kun ligno kaj branĉplektaĵo sur platformo, sendube jam en la tempo de la uzado staris super la akvo malproksime de la bordo, sufiĉe alte por ne esti difektotaj de altakvo, kaj estante sufiĉe grandaj kaj ampleksaj por taŭgi por la diversaj okupoj kaj bezonoj de la loĝantoj. »Tie ĉi oni kuiris kaj ŝpinis, oni faris ŝnurojn, vestaĵojn, ĉasilojn kaj fiŝkaptilojn; la serpentenŝtono, la ostoj de diversaj bestoj, la kornoj de cervoj estis materioj por diversaj iloj; argilaĵoj estis farataj k. t. p.; tie ĉi estis do entreprenitaj ĉiuj metioj kaj artoj, kiujn la loĝantoj sciis. Ĉiuj defalaĵoj el ligno, restaĵoj de manĝitaj bestoj, neuzeble estiĝintaj iloj estis jetitaj en la akvon, kie ili profundigis en la aluvio.» Entute la unua raporto de la esploro estis, kvankam ne senerara, tamen je la ĉefpartoj ĝusta priskribo pri paliskonstruaĵaro en alp-lago.

Tamen unu afero estis neklara, kaj restis tia ĝis nun: kio povus inklini la homojn fondi siajn hejmojn sur palisstablojn en akvo, anstataŭ sur firma grundo? La ŝirmbezono, supozas Keller en sia unua raporto, estus la kaŭzo de la stranga konstrumaniero, la neceso »certigi vivon kaj posedaĵojn tiel kontraŭ surprizataĵoj kiel kontraŭ sovaĝaj bestoj.» Sed tiu ĉi solvo estas almenaŭ nesufiĉa. Laŭ multaj trovitaĵoj ni scias, ke la prahomo en la diluvia epoko estis sukcesa ĉasisto de la praelefanto kaj ĝia pli juna

parencio la mamuto; li persukutis rinocerojn, grotursojn kaj grotleonojn en iliajn rifuĝejojn en roktruoj, kaj estis ĉe tio venkanto — venkanto spite armilaro malpli bona ol tiu de la plejfruaj paliskonstruaĵanoj. La rabbestoj, tiam ankoraŭ troveblaj en la svisaj arbaroj, estis nur lupoj kaj brunaj ursoj, kaj pro ili la paliskonstruaĵanoj supozeble ne estus rifuĝintaj sur la akvon. Tiu kiu faligis ne nur cervojn kaj alkojn, sed ankaŭ prabovojn (Bos urus) kaj visentojn, estis kredeble kapabla ankaŭ ŝirmi sin kontraŭ lupoj kaj ursoj. Aŭ ĉu malamikaj popolklanoj kaŭzis, ke la svislandaj loĝantoj aranĝis siajn vilaĝojn sur lago anstataŭ sur lando? Oni trovis nombron da fortikaĵoj (ŝtonmuroj kaj palisredutoj), kiuj ŝajnas montri, ke seriozaj bataloj kun najbaraj klanoj okazis sur ĝusta fundo, kaj la supozo eble estas ĝusta, ke tiaj malpacaj devigis la prasvisojn aranĝi siajn loĝejojn sur la lagoj flanke de la batalkampo, por ŝirmi virinojn kaj infanojn. Kontraŭ tiu ĉi supozo tamen troviĝas la fakto, ke ankoraŭ nuntempe multaj naturpopoloj faras paliskonstruaĵojn, kiuj ne koncernas militertecon, nek povas esti kaŭzitaj de timo je sovaĝaj bestoj, sed kiuj algrade havas higienan valoron laŭ la difinoj faritaj sur Celebes de la famaj esplorvojaĝistoj Paul kaj Fritz Sarasin. Ne nur la ondmovado inter la palisoj konstante forakvumas la forjetaĵojn kaj malpurajojn de la loĝejoj (kio restas kuŝante sur la tero en la surlandaj indiĝenvilaĝoj de Celebes, kaj fiodoras abomene je plej alta grado); la loĝantoj estas ankaŭ ŝirmataj kontraŭ la suferoj pro insektoj kaj kontraŭ ekestigo de amasmortigaj epidemioj. La kuzoj Sarasin supozis pro tio ke ankaŭ la ekkonstruado de la paliskonstruaĵoj en ilia svisa hejmgregiono havis similajn kaŭzojn, per kio la aliaj supozoj estus refutataj. Estas pri la paliskonstruaĵoj, kiel rilate al la piramidoj kaj ilia sfinksekreto: klarigoj post klarigoj, el kiuj iu eble estas proksima al la efektivaj cirkonstancoj, sed el kiuj neniu definitive solvas la problemon.



Bona ago estas plenumata kun peno, sed kiam la peno ripetigas kelkafoje — la sama ago iĝas kuinto. *Leo Tolstoj.*

La helplingvoj en Afriko.

(Hjälpspråken i Afrika.)

Multegaj estas la lingvoj kaj idiomoj inter la gentoj de la tropika Afriko. Tiuj ĉi lingvoj kaj idiomoj estas sufiĉe nesimilaj, por ke la diversaj gentanoj ne sin reciproke komprenu; aliparte multaj estas malfacile lerneblaj por la negroj mem, tamen tre emaj al la lernado de ĉiuj lingvoj. Tial por la komercaj rilatoj, propramove kreigis *intergentaj* lingvoj, simpligitaj, sengramatike faritaj, tute same kiel Esperanto, el vortoj elektitaj per uzado inter diversaj idiomoj. Kun kvar el tiuj ĉi *Esperantetoj*, oni povas trairi de Atlantika Oceano al Nilo; sen ilia helpo, necesa estus la elkonado de pli multaj ol dudek lingvoj. — — — Neniam mi vidis, ke la intergentaj lingvoj difektis la gentojn. Tiuj ĉi estas restintaj kun sia propra spirito, elparolado, vortaro kaj gramatiko. Mi konfesas, ke tie ĉi mi temas pri nuraj kaj humilaj idiomoj negraj. La fakto tamen ŝajnis al mi interese notinda. Ĝar ĝi alligigis kun psikologia fenomeno, rilata al la influo nevenkebla de la fizika kaj geografia medio. La dua lingvo estas nur interkonsentita kaj, iamaniere, superaldonita, kaj neniel atakas la heredan kaj fortikan fundamenton de la raso.

El artikolo de D-ro A. Cureau en *Scienca Revuo*, 1905.



En la gimnazio.

Gimnaziano Pettersson devis konjugi senregulan grekan verbon, sed malsukcesis. La instruisto, D-ro Kahlén, serene kaj patose deklaras: »Eĉ havenlaboristo en la antikva Pireus ne estus uzinta tian esprimon!»

* * *

Argumento.

— Kial vi konsideras la virinojn pli inteligentaj ol la viroj?

— Senhara viro aĉetas amasojn da harkreskigiloj, ĉu ne?

— Jes, kaj?

— Nu, virino ne malŝparas tempon per tiaj senencaĵoj, sed ŝi aĉetas harojn.

Tri Katidoj.

(Tre kattangar.)

Tri katidoj,
Ĉarmaj idoj,
En ĝarden' promenaj;
Ili ridas,
Kaj ekvidas
Ke tri musoj venas.

Tre rapide,
Tre perfide,
Ili nun sin kaŝas;
Nu, silento!
Nu, atento!
La musetoj pasas.

Sed katido
En la sido
Tusas, kaj, trioje
Tiu' musoj
Pro la tusoj
Turnas sin galope.

Ho! la trio
Kun ekkrio
Post la musoj saltas!
Tro malfrue,
Ĝar entruo
Nun la musoj haltas.

Ili tie
Konvulsie
Ridas, nek kompatas,
Dum la duo
Pro la bruoj
La kulpulon batas.

C. Bicknell.

El The Esperanto Monthly.



S. E. F.

Inbetalda årsavgifter för år 1915:
G. Jönsson, Bomhus.

Kvitteras Gefle den 1/11 1915.

J. Helsing.
Kassör.



Ĉe ekzameno.

Profesoro (kiu demandas pri telegrafado kaj volas helpi la ekzamenaton): »Kiam mi ekzemple puŝos sur tiu ĉi butono, kio okazos tiam?»

Studento (tre embarasita): »Envenos via servistino».



Esperantokongresen i San Francisko.

Enligt det beslut, som fattades i Bern 1913, skulle 11:te internationella esperantokongressen ha ägt rum i Edinburgh detta år. Omständigheterna förhindrade emellertid kongressens hållande i Storbritannien, och av denna anledning blev densamma i stället förlagd till San Francisko i samband med nordamerikanska esperantoförbundets årsmöte.

Ehuru flertalet av esperantoorganisationerna i Europa voro förhindrade att sända ombud till kongressen, blev densamma dock synnerligen beaktansvärd i många avseenden.

Kongressen öppnades den 23 aug. Till ordförande valdes de skotska esperantisternas representant, hr Robert Colquhoun, till vice ordförande professor Langville från universitetet i Berkeley samt till sekreterare hr D. E. Parrish.

Den 24 augusti företogs utfärd till Tamolpais-berget; den vanliga konserten ägde rum den 25 med tillträde även för icke-esperantister; på aftonen den 27 hölls propagandamöte och den 28 var världsutställningens »Esperantodag». Alla dessa manifestationer tilldrogo sig synnerlig uppmärksamhet. »De tala verkliga språket», var en anmärkning, som man ofta fick höra.

Vid arbetsmanträdena behandlades bland annat särdeles utförligt frågan om Esperantos ställning som undervisningsämne i läroverk av skilda slag. Kongressens uttalande för att nästa internationella esperantokongress hålles i Köpenhamn efter krigets slut, har redan meddelats i La Espero.

Kongressens högtidliga avslutande ägde rum i världsutställningens festhall den 28 augusti. Av utställningsbestyrelsens representant överlämnades därvid tre minnesmedaljer, nämligen till nordamerikanska esperantoförbundet, till 11:te esperantokongressen och till Universala Esperanto-Asocio.

Doktor Zamenhof

med familj har, såsom redan i förra numret i korthet meddelades, kvarstannat i Varsava under belägring-

en, samt har efter den tyska ockuperingen mottagit besök av några esperantister ur tyska armén.

Manuskriptet till Gamla Testamentet på Esperanto, avsett att utgivas av britiska bibelsällskapet, har på grund av den otrygga posttrafiken ej ännu blivit avsänt till London, utan befinner sig kvar hos dr Zamenhof.

Holland.

De katolska esperantisterna i Nederländerna ha hållit sin »Esperantodag» i Bossum. Omkring 100 deltagare.

I belgiska interneringslägret i Zeist hålles nu den tredje esperantokursen. Esperantoföreningen i interneringslägret vid Harderwijk bedriver alltså en lika livlig som framgångsrik propaganda. Även från stadens befolkning hava inbjudningar nu framställts, att anordna kurser.

En esperantokurs för post- och telegrafpersonal tog den 4 oktober sin början i Haarlem. Avsikten är att bilda en lokalförening av det esperantistiska post- och telegrafpersonalsförbundet, vars ordförande är postinspektör Riennzi i Paris. Kursen räknar tolv deltagare och postdirektören i Haarlem har för dess räkning upplåtit lokal i posthuset.

Storbritannien.

Ehuru krigshändelserna upptaga nästan allt intresse, ha distriktsförbunden dock hållit sina årssammanträden i vederbörlig ordning, delvis med rätt stor tillslutning. Kurser anordnas för vintern i ett stort antal städer. I London äro ett flertal kurser anordnade, avsedda att pågå ända till påsktiden med två lektioner varje vecka. I Bradford har skolstyrelsen åtagit sig en del av kostnaderna för esperantoverksamheten under vintern.

Tyskland.

I fånglägret Altengrabow anordnas två nya esperantokurser för fransmän och belgier, varav en fortsättningskurs och en kurs för nybörjare. Samtidigt hålles en kurs bland de ryska fångarna. I lägret Münster har hr Petit, fransk krigsfånge, hittills meddelat esperantoundervisning åt 120 personer. Han öppnar nu nya kurser.

Frankrike.

Esperanto utbreder sig bland civilfångarna i lägret på ön Sieck utanför Quimper i Bretagne.

Serbien.

Esperantokurs bland krigsfångarna i Čuprija.

Madejra.

Föreningen »Verda Stelo» i Funsal har nu över 100 medlemmar. Två kurser pågå för närvarande.

Afrika.

En esperantoförening har bildats i Loanda.

Japan.

Esperantokurser hava med mycket goda resultat hållits i Hirosima, Kobe, Tokio och Kanazua. Hr och fru Kostin, esperantister från Harbin i Mandjuriet, hava med hjälp av Esperanto genomrest Japan.

Danmark.

I Aarhus återupptog »Konversacia Klubo» den 2 september sin verksamhet för vintersäsongen, varvid hr Heilskov höll föredrag om en resa till Färöarna, illustrerat av ett större antal vackra akvarellskisser.

Klubben har anskaffat en ljusbildapparat för elektriskt ljus, vilken första gången användes den 30 sept., då hr Hvorslev föreläste om en resa i Sverige.

**Esperanto en Svedujo.****Gävle.**

La ordinara aŭtuna kurso komencis la 14-an de Oktobro kun 22 partoprenantoj instruataj de s-ro W. Wahlund, administranto de nia gazeto.

La socialdemokrata junece klubo de Gävle komencis senpagan esperantokurson por siaj membroj. En la kurso, kiu estas gvidata de E. Adamson, partoprenas 13 membroj.

Skutskär.

La klubo esperantista malfermis kurson kun 17 interesataj partoprenantoj. La gvidanto estas nia fervora samideano s-ro O. Magnusson.

**Norvega kroniko.**

Trondhjem. La plej grava gazeto de la urbo, »Dagsposten», aperigas Esp.-kronikon verkitan de s-ro J. O. Naalsund. La intereso por Esperanto revekigās. La grupo aranĝis ekskurson al la akvofaloj »Lerfossen». (»Esperanto»)

En la kazerno de la infanteria suboficira lernejo, kie S-ro Ragnv. Rian faris paroladon pri Esperanto, kurso estas starigita kun 24 partoprenantoj. (Laŭ »Dagsposten»)

Rjukan. Klubo fondita la 6/5. Prezidanto s-ro H. Kilen, sekretario s-ro K. Karlsson, kasisto s-ro A. Sterner (adreso: malermester Amundsens gaard, Bön, Rjukan). Kurso starigita, lecionoj dufoje ĉiusemajne, fervora la intereso. Sed la fondinto kaj ĝisnuna korespondanta sekretario de l' klubo, sveda samideano s-ro C. G. Eriksson, nun bedaŭrinde forlasis la regionon, forvojaĝinte Göteborgon.

Kristiania. Jam depost pasko pasinta la ejo de »Urd» ne plu estas nia kunvenejo, pro kelkaj privataj kaŭzoj, precipe tial ke la entrepreno ŝanĝis posedantaron. Ni nun kunvenas en la salono de f-ino Finholt, Akersbakken 25 C^{IV}. Tie okazas merkredon vespere je la 7a h. kurso por progresintoj, gvidata de f-ino Bye, kaj je la 8a h. nia ordinara kunveno.

La 1 sept. estis fondata »Norske Læreres Esperantoforening» (N L E.), t. e. Esperanto-Unuiĝo de Norvegaj Instruistoj (E. U. N. I.). Prezidanto f-ino Bye, sekretario f-ino Finholt, kasisto f-ino Marie Heimbeck. Nome de la unuiĝo s-ro S. Engesgaard Christie komencis kurson por komentantoj la 15 okt.

Vizitis nian urbon dum libertempa vojaĝado 9—26 de julio gesinjoroj J. Helsing el Gävle kaj f-ino Helmi Josefson el Stockholm, fine de aŭgusto s-ro kuracisto O. Huber el Bern.

S-ro H. Bonnevie, kiu faris malgrandan rondvojaĝon en Danujo, havis la plezuron ĉeesti la VII danan jarkunvenon en Odense 10—11 julio. Li konstatas ke oni decidis daŭrigi ankaŭ dum la venonta jaro la eldonadon de »Esperanto Raporto» anstataŭ aliĝi al »La Espero». Ĉar E. R. donis profiton por la pasinta jaro (1914), oni

certe ne rajtas riproĉi ke la danoj ne deziris nenecese transiri al pli multekosta entrepreno.

**Patro estas en la milito!**

Kion mi vidis kaj aŭdis.

De H. Wegs.

Mia ladisto, alie tre akurata homo, ne venante min embarasigas. Tial mi mem iras por lin admoni. En la laborejo — neniu. En la loĝejo min akceptas malgrandulino, kiun mi taksas sepjara, sed poste mi aŭdis, ke ŝi jam havas dek du jarojn. Maldensaj blondaj haroj estas algluitaj ĉirkaŭ la pala vizaĝeto, ne plibeligita per du akvokoloraj strabokuloj, sed la mizera korpeto estas vestita per purega kitelo. Kun la rutino de urbega junularo ŝi invitas min eniri la ĉambron, mediteme ŝi aŭskultas mian plendon.

»Ĉu via patro ne ĉeestas?», mi demandas.

»Ne!» ŝi diras kun freŝa, decida voĉo.

»Patro ja estas en la milito. Kaj vi ne povas imagi, sinjorino, kian multegon »ni» devas fari! Panjo nur povas prizorgi la mastrumadon kaj la infanojn (kvazaŭ ŝi jam ne estus infano!), kaj la plej aĝa submajstro devas prizorgi la klientaron ekster la domo. Nu, kaj per la lernistoj oni havas ja multe da ĉagreno. Apenaŭ iu ajn estas iomete instruita, li estas »enarmeigata» (ŝi efektive diris »enarmeigata»), kaj tiam la serĉado kaj instruado denove komenciĝas — — —»

La telefono sonoras. La malgrandulino rapidas al la aŭdilo.

»Ĉi tie ladistmajstro N.! Kion vi deziras? Ho — ja — jes — certe!»

Kaj nun ĉe la telefono komenciĝis kapbalancado, komplimentado kaj klarigado; oni devis kredi, ke la majstro mem tie estas. Mi devis min regi por ne laŭte ekridi.

Poste la etulino kun pardonpetanta manmovo sin denove turnis al mi.

»Mi prizorgados, ke via moŝto morgaŭ ricevos la objektojn — —»

Roto da krietaj, ne tro pure vestitaj knaboj entumultas en la ĉambron.

»Lizo — — — Karlo — — —»

Per energia manpreno ŝi ilin reel-pelas el la plej proksima pordo, embarasite kaj ruĝegiginte ŝi min aridetas.

»Vi mem vidas, sinjorino, oni devus efektive sin disŝiri nun!»

Kun sincera admiro mi forlasis la junan heroinon, kiu tiel kuraĝe prenis sur siajn delikatajn junajn ŝultrojn la sekvojn de la milito.

Esperantigis M. H.

El Germana Esperantisto.



Fine! — tute antaŭ la celo.

Mirinde!

Ĉu la fundamento por nia anima vivo devas esti — logika pensado pri la eterna konscia kaj senkonscia laborado de la eternaj universaj ŝtofoj? — ankaŭ la fundamento de moralo kaj por la moroj?

Ĉu miaj riĉaj fantaziaĵoj, — mia fortega sentvivo kun ĉiaj ekscitaj efektoj ne kresku sovaĝe? — sed estu kontrolataj kaj ekkutimos aranĝi fakton ĉe fakto por kompreni malgrandan kampon de la animvivo de la eterna homaro?

Ho ve!

Mi ofte suferos per tio pro la malfaciloj, — ankaŭ pro tio, ke mi nur parte komprenas la eternan vivon inter proporcie malgrandaj limoj kaj malmultaj kampoj; — ho ve!

Ankaŭ ofte pro la nepre necesa kredo, kiun la nur unuflanke sciigantaj instruistoj donas al mi.

*

Sed ju pli multe da tiaj malgrandaj kampoj de la universa vivo oni povas kompreni, — des pli multe da feliĉo donas al ni la vivo, — efektive estas kvazaŭ nia travivita certeco pri la fluo de l' etero kiel deveno de ĉiu konscia kaj senkonscia laborado, — de »la tuta vivmovado«, verŝas novan sangon en miajn arteriojn kaj iom post iom dum la tempo en kiu niaj konoj plimultiĝas kaj granda supervidaĵo estas gajnata, oni tute ŝanĝigas kaj oni trovas la feliĉon de la vivo.

*

Dum — kaj longe post la juneco estas la ordinara situacio, ke en la

tuta mondo alia ne povas kapti nian pensadon al revoj kaj fantaziaĵoj.

Sed oni superkreskos tion!

Iom post iom la revoj perdos siajn potencojn; — mi vidos kaj aŭdos la realan vivadon, — profundan vidon de la realaĵoj kaj realeco.

Ŝajnas al mi, ke tiu ĉi estas la plej mirinda revo, kiun mi iam havis.

La vero de la situacio estas certe la sama kvazaŭ mi estus maturigata al la virineco aŭ vireco.

*

Ho feliĉe!

Mi sen timo povas min doni al la uzado de la vivo, ĉar mi vidos tion, kio estas, — kaj ankaŭ tion, kio ne estas.

Spéciale — kontraŭ iu okazo mi komprenas kien mi mem estos ironta, ĉar la spertoj kaj la scio pri pozitiva laborado donis al mi povon kaj volon por teni klaraj la homajn fundamentaĵojn en mia kompreno.

Laŭ plej profundaj manieroj mi nun donas valoron al la objektoj kaj okazaĵoj, — kaj mi prenas la ĉagrenon kaj gojon por tio, kio ili reale estas.

*

Sed ne imagu, ke tia starpunkto estas gajnita sen turmentoj, suferoj kaj seniluziaĵoj; — la praktika vivado kaj la vivo reala ne ŝparas iun. Dume viaj portitaj ŝarĝoj estos instruantaj al vi la amon de viaj kunhomoj; — ĉar vi konis la valoron de tiu ameco, kiu iam vin helpis; — kaj vi esperos plene de vivindaj kondiĉoj por ilia estonteco.

La reala vivo donos al vi la ĝustan komprenon pri nia propra, homa vivsistemo, kies limoj estas naskiĝo kaj morto.

Tamen vi ankaŭ komprenos, ke vi apartenas tute al la eterna universa vivunueco, ĉar vi sperte komprenas, ke via tasko kiel homo estu realigi sur la tero por la eterne vivanta homaro individuan ilon de la Dia amo, vero kaj toleremo.

*

Certe — sub la lumo el la ĉielo de la pozitivaj sciigoj pri la eterna vivo en spirito kaj vero oni enspiras prudenton de la humileco, kiu ne premeĝu, sed liberigu nian povon por helpi.

Kaj per la ĉarmega lumo de tiu ĉielo vi vin nun vidas staranta sur

altega pinto, sed — sen iu timo de kapturino vi povos levi vian rigardon el la abismo al la plej grandaj, feliĉportantaj vidaĵoj, — mire vidante la ĝeneralan regulon, ke la donataj kondiĉoj aŭtomate kondukas laŭ la ekzerco de la origina ŝtofa kombino la vivproceson de ĉiu korpa sistemo.

Sed rimarku bone, ke la homo per sia konscia pensado povas vidi la vojon post la faktoj kaj ankaŭ per uzo de sia logiko povas konkludi ĝin antaŭ tiuj.

*

Ĉie sur la pinto la karaktero estas plenvalore ĉizata por ke ĝi, vidante la sufiĉon, povu kapti kaj realigi vivcelon, — ĉiam instruata de la vivo mem pri la ameco de Dio kaj la beno de la laboro, kiu sin formas per la homa pensado por la plenumiĝo de la vivbezonoj.

*

Kaj fine: Ĉiaj grandaj kontraŭbataloj en la konscienco kaj en viaj deziregoj estas ĉarmega interkonsento, ĉar vi ĉiam havas ĉiujn celojn inter la limoj de via pens-kaj laborpovo kaj aŭtomate vi realigas la bonon.

Tiam vi estas akirinta la ateston, ke vi en via pensmaniero estas prudenta, fidela kaj nedevigebla, kaj ke vi amis la vivon kaj ne timas la morton.

B. J. K. (1915).



Libroj kaj gazetoj.

La origino de la mondmilito laŭ la publikigaĵoj de la Triple-Entente-ŝtatoj de Dro Karl Helfferich. Esperantigis Arnold Behrendt. Eldonita de Deutscher Esperanto-Dienst (Germana Esperanto-Servo) Berlin S 59, 1915. Prezo inkl. afranko: 0.300 Sm. (3 respondkuponoj).

Tiu ĉi libro estas popularstila resumo de angla-rusa-franca blua-oranĝa-flava libraro kune kun komentarioj laŭ la germana percepto. La aktuala abomena tragedio nepre koncernas eĉ la loĝantojn de tiuj landoj, kiuj feliĉe ne ludas ĉefrolojn en la granda spektaklo, tamen ankaŭ suferantaj ĝiajn konsekvencojn. Kun vola-nevola aŭdemo ni aŭskultas,

kion oni deklaras ambaŭflanke. Rilate al tiu ĉi germana libro, nia kredo estas ke la enhavo estas kvankam absolute ĝusta, tamen ne tute kompleta. Sed ni supozas, ke multe da dokumentoj ankoraŭ kelktempe devas resti sekretaj — tiel en Germanujo kaj Aŭstrio, kiel en Rusujo, Francujo kaj Anglujo — kaj nur niaj posteuloj povos tute trankvile studi la nunajn mondhistoriajn okazojn. Ni ne scias, ĉu oni en la malproksima estonto aljuĝos la kulpajn ekskluzive al nur unu el la partioj. Militarismo kaj militemo ja povas esti diferencaj aferoj, kaj ricevita Entente-presajo ankoraŭ ne sukcesis konvinki nin, ke la evidenta militarismo en Germanujo estis kombinita kun militemo dum la nuna generacio.

Autau ne longe ni legis opinionon, ke la agado de »Germana Esperanto-Servo« estus nebezona, ĉar la tekstoj estas jam publikigitaj en la *holanda* lingvo. Sed, malgraŭ tio, ni esprimu sinceran deziron ke ĝiaj eldonaĵoj estu legotoj, kiel eble plej baldaŭ, en vastaj rondoj en Rusujo, Anglujo kaj Francujo.

Fine ni konstata, ke nia Esperanto estas pruvite tre bontaŭga ankaŭ por pritrakti tiom malsimplan temon, kiom estas komplikitaj diplomaciaj krucovojoj.

Rigardanto.

Eldonoj de la Komitato »Por Francujo, Per Esperanto,« 51, rue de Clichy, Paris:

Flugfolio n:o 5: *Germanaj Atestoj pri germanaj krimoj.*

Flugfolio n:o 6: *La Martiro de Belgujo.*

L' Esperanto. Enhavo de n:o 6—7: Leciono de Tipostenografio. — Lecionoj en la portugala kaj itala lingvoj kaj en latino. Metoda Vortaro itala-esperanta. — La Papa Preĝo por la paco. — Japanaj kaj friulaj proverboj. — Bukedo da narcisoj (poeziaĵo en friula lingvo kun esperanta traduko). — K. t. p.

Post la milito la eldonejo aperigos revueton en ladina lingvo kun esperanta ortografio. Tiu jurnaleto celos konigi Esperanton al la ladinoj — t. e. pli ol 600,000 loĝantoj en Friulo, Tirolo kaj kanton Grizonlando (Graubünden) en Svisujo, kiuj parolas dialektojn de malmulte konata, sed tute memstara lingvo deveninta el la latino.

La Naturisto. Nova jurnaleto presita per multobligilo. Adreso: S-ro Eric Biddle, B. E. N. A. »Selborne«, Western Rd., Wylde Green, Birmingham, Anglujo. Prezo 6 pencoj por 1915.



Ĉu mi kuraĝas?

Per meminstruado mi lernas la lingvon Esperanto, ankaŭ mi aĉetis verdan stelon; sed porti ĝin — ĉu mi kuraĝas?

Kiam mi foje vagonarveturis, viro envenis vagonon portante la stelon. Volonte mi deziris alparoli lin, sed — ĉu mi kuraĝas? Jes, mi kuraĝis. Tuj, kiam ni komencis interparoli, alia viro aperis dirante: Mi aŭdas ke vi parolas nian lingvon, mia nomo estas — — —

Mirinde! estas ja la sama viro, kiu ĵus estis mia benkkamarado, kaj mi ne sciis ke li estas samideano.

Ke la daŭro de nia veturado — dank' al la samideano, kiu portis la stelon — estiĝis tre agrabla, estas malnecesese diri.

Via inda »La Espero« estas ĉiam bonvenanta. Ofte mi deziris skribi al ĝi, sed, estimata redaktoro — ĉu mi kuraĝas?

Malkuraĝulo.



Labori kaj pensi kaj lerni estas vivi. *De Géneset.*

L' ESPERANTO

Ĉiumonata Internacia Revuo eldonita sub la aŭspicioj de la *ITALA KATEDRO DE ESPERANTO.*

En ĉiu numero ĝi publikigas:

Lecionojn de Itala, Latina kaj Portugala Lingvoj per Esperanto
Sinonimaron de E. Metodan Vortaron de E.

Rakontojn, Dramojn, Konkursojn kun monpremioj kaj aliajn interesajn fakojn. — *Jarabono por 1915 Fr. 3.25 (Sm. 1.300).* La Revuo aperos regule ankaŭ dum la milito. Unua Jarkolekto - 1913 - enhavanta 21 lecionojn de Itala Lingvo Fr. 2 (Sm. 0.800). Dua Jarkolekto - 1914 - Fr. 3.25. - *Al la Abonantoj por 1915: 1 Sm. Specim. kontraŭ respondk. Konto ĉe la Ĉekbanko E. - London.*

Sin turni al la firmo A. PAOLET — S. VITO AL TAGLIAMENTO (Italia).



Gävle Esperantoförening

Ordinarie månadmöte avhålls tisdagen den 7 dec. kl. 8 e. m. å kafé D' Angleterre. Efter mötet samkväm.

Föreningens bibliotek är flyttat till kafé Esperanto. Böcker utlånas genom bibliotekarien, herr Örn, eller kaféinnehavaren, herr Holmstedt, extra bibliotekarie.

Läs

Templaren

Templarordens officiella organ!
Vaken. & Omväxlande.
Pris pr år Kr. 2:50.

Esperanto per korrespondens.

En korrespondenskurs i Esperanto, varigenom korrespondensmetodens alla fördelar tillämpats på Esperanto, är nu färdig. Det blir härigenom möjligt för var och en att **på lediga stunder** lära sig det internationella hjälpspråket.

Lättfattlig. Grundlig. Intressant.
Begär prospekt! Erhålles mot porto.

R. Pehrsson, 3-23, Gävle.

Vartför skall Sverige stå efter

de stora länderna i fråga om Esperantos spridning?

Rekvirera propagandabladet och visa alla Edra bekanta!

Pris för 3 st. 10 öre, 100 st. 1:35, 500 st. 6: — och 1000 st. 10: — allt portofritt från

Sveda Esperanta Federacio, Gävle.

Ĉetebbla elkonstruata akvoforto

en la okcidenta Norvegujo preskaŭ unu tagvojaĝon pli norde ol Bergen, kun grundo por estonta fabrikejo apud glaci-libera haveno konvena por la plej profunda iro de la ŝipo al kajo estas montrota ĉe mia kontoro. La prezo estas por uzo tagon kaj nokton po jaro 30 — tridek — kr. skandinavaj po H. P. (75 ^{kgm.} / sek.) aŭ 40,80 kr.s. po 1000 watt'oj. La unuaj 15000 H. P. havigeblaj post 2 jaroj de la tago por subskribo de la kontrakto, kaj plie 15000, se mendotaj, post la plej proksimaj 2 jaroj.

Brynjulf J-hss Klingenberg's Patentkontoro
Prof. Dahls Gate 18 II, Kristiania, Norge.

HERRAR
EKIPERA SIG BÄST OCH
FULLSTÄNDIGAST HOS
Axel Lidholm
Drottninggatan 30 -:- GEFLE

Kiam vi bezonas
viandon, mendu
ĉe
FRANS A. OLSON
Telef. 34 □ GEFLE □ Telef. 34

"LA ESPERO"
Gamla årgångar av La Espero (år 1913 och 1914) finnas i ett begränsat antal och säljas till ett pris av 1 kr. pr st. Varje esperantoförening ävensom varje intresserad esperantist bör äga dessa.
Lösnummer av tidningen kunna för spridning i propagandasyfte erhållas gratis av intresserade.
Tillskriv *La Esperos expedition, Gävle.*

Josef Wikströms
Tobakshandel
GEVALIAPALATSET - GEFLE

Central- och Jernvägshotellen
GEFLE
REKOMMENDERAS!

**MEST NÖJDA BLIVA NI MED
ETT BESÖK Å**
Café "Esperanto"
DROTTNINGGATAN 29 - GÄVLE
Rikstelefon 201
Inneh.: C. G. Holmstedt.

SKODON
Största sortiment hos
A. M. Zimmerman & C:o

C. J. LINDH
BOK- & DISTRIBUTIONSÄFFÄR
S. FÄLTSKÄRSGATAN 19, GEFLE
Rekommenderar sig vid behov av
Böcker, Tidskrifter och Häftesarbeten.
RIKSTELEFON 16 97.

ESPERANTISTER!
Köp och drick den verkligen goda njutnings- och sällskapsdrycken
ESPERANTO PUNĈO
Alkoholfri.
REKV. FRÅN ANTON ÖSTLING,
Styrmansgatan 36, NORRKÖPING.



Freds- & Julnumret
utkommer i nov. 10:e årg.
Gediget innehåll! God utstyrsel!
Bör rekv. genast och spridas i massa.
Pris 25 öre. Vid parti 20 proc. prov.
Unga Tankars Exp., Lidköping.

Förall vaken ungdom
är S. S. U. H:s organ

POLSTJÄRNAN
värdefull genom sina gedigna artiklar
om aktuella, sociala och kulturella
spörsmål, samt om litteratur och konst.

Prenumerationspris å posten: helt år kr. 1: 50, 1/2 år kr. 0: 85; hos Polstjärnans exp., Upsala: helt år kr. 1:—, 1/2 år kr. 0: 50.

Esperantopapeterkartong, 25 ark brevpapper + 25 kuvert, damf. 1: 50

Esperantopiepenor, 30 öre st., 3:— kr. dussin (hårda eller lösa).

Esperantoblyertspennor, 10 öre st., 1:— kr. duss. (hårda eller lösa).

Allt franco.
Beställes hos **W. Wahlund, Gefle.**

Nyutkommen broschyr:
Världsspråksfrågan - en livsfråga
av Einar Adamson.
Pris 25 öre. Rabatt då minst 10 ex. rekv.
Rekv. från **Gävle Bokförlag, Gävle.**

Wickmans Kappaffär
NORRA KUNGSGATAN 7 - GEFLE
Vid Rådhusplanaden.
Kappor o. Promenaddräkter i stort urval.
Beställningar emottagas o. utföras förstklassigt.
RIKSTELEFON 1591.

Gust. Holms Förstoringsanstalt
Brunnsgatan 78, Gefle. •• Rikstel. 16 28.

Faras pligrandigojn laŭ fotografajoj.
Unuaklasa laboro. Petu prezaron!

N. Lundgren
GEFLE - Interurba tel. 151

Kamentuboj por fabrikoj.

Pli ol 800 konstruitaj.
Riparoj dum uzado.
Fulmkonduktiloj estas muntataj.
Propra brikejo en Upsala.
Plej granda firmo por konstruo de fabrikoj kamentuboj en Skandinavio.
Argenta medaljo en Stockholm 1897
» » » Gefle 1901
» » » Norrköping 1906

E. Liljemarks
Cigarr- och Tobakshandel
S. Centralgatan 28 och S. Kungsgatan 26
rekommanderas!
Prima varor till billigaste priser.

Från **"La Esperos" Expedition, Gefle,**
kan rekvireras utkommen litteratur m. m.
Å lager finnas **Läroböcker:**
Lärobok i Esperanto av
P. Nylén..... 1:— + porto 0: 12
Lärobok i Esperanto av
G. H. Backman..... 1:— + » 0: 16
Lärobok i Esperanto av
Carl Ohlsson 0: 50 + » 0: 08
(Alla med Esp.-svensk ordlista)
Esperantospråklära av
O. W. Hjærtstätt ... 0: 40 + porto 0: 08
Esp.-svensk ordbok av
P. Ahlberg 1: 75 + » 0: 16
Svensk-esp. ordbok av
E. L-son Finn 1: 50 + » 0: 12
Esp.-svensk o. Svensk-
esp. ordbok av Hjært-
stätt 0: 60 + » 0: 08
Unua Legolibro av Dr.
Kabe 1: 60 + » 0: 12
Nova Testamento
(mjukt band) 2: 50 + » 0: 30
"La Espero" oficiala
himno esperantista,
med musik 0: 60 + » 0: 04
D: o, propagandablad 0: 05 + » 0: 04
Sveda Kantaro, kun me-
lodioj 0: 35 + » 0: 08
Esperantista Kantaro... 0: 75 + » 0: 04
Världsspråksfrågan - en
livsfråga av E. Adamson 0: 25 + » 0: 04
Esperantostjärnor 0: 75 + » 0: 10
D: o, (officiella, för med-
lemmar av U. E. A.) 1:— + » 0: 10
D: o, (miniatyr) 0: 35 + » 0: 10
Esperantobordsflaggor 2: 40 + » 0: 30
D: o (något enklare) 1: 75 + » 0: 30
D: o (windre) 0: 85 + » 0: 30
Esperantoflagga 0: 50 + » 0: 08
D: o (miniatyr) 0: 15 + » 0: 04
Reklammarken, 25 st. 0: 45 + » 0: 04